

Pola

Esperantisto

Esperantysta Polski

XXXIII JARO

NRO 2

FEBRUARO 1939

ELDONANTO — WYDAWCA

POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO

REDAKTANTOJ — REDAKTORZY

PROF. DR ODON BUJWID — MGR TADEUSZ HODAKOWSKI

Aperas la 20-an de ĉiu monato. Redakcian materialon oni petas sendi ĝis la 10-a de ĉiu monato. La redakcio estas rajtigita laŭ bezono ŝanĝi la tekston de manuskriptoj.

LERNEJA INTERŜTATA ESPERANTO-AKORDO.

La Esperanto-mondo staras antaŭ unu el plej decidaj momentoj de sia ekzisto, dank' al la nelacigebla agado de Brazila Ligo Esperantista. Ĝiaj gvidantoj: Ing. Alberto Couto Fernandes, dumviva Prezidanto, kaj Dro Everardo Backheuser, Honora Prezidanto de la Ligo, restos por ĉiam veraj fondintoj de la nova epoko en la Esp. — movado, kaj ilia bela lando Brazilo aldonos novan laŭrofolion al la laŭrokrono, kiu ornamas jam multajn antaŭajn agojn de vera progreso.

Brazilo estas la unua lando, kiu antaŭ 30 jaroj deklaris Esperanton lingvo klara por la uzo de poŝto kaj telegrafo. Brazilo eldonis la jubilean poŝtmarkon. Brazilo aranĝis belegan Internacian Filatelian Ekspozicion en Rio de Janeiro kun grandega aro da prospektoj, gvidlibroj, flugfolioj kaj glumarkoj. Ĝis nun neniam tiom granda ekspozicio de esperantaĵoj aperis antaŭ la publiko. 4 salonoj de la Nacia Muzeo de Belartoj, kiu staras sur multe vizitata Avenuo Rio Branco, estis plenigitaj de esperantaĵoj. Aliloke ni preparolas speciale tiun gravan entreprenon.

Ambaŭ prezidantoj supre nomitaj, Sinjoroj Backheuser kaj Couto Fernandes, plenumante la ĉefan rezolucion de la Jubilea Kongreso en Varŝavo, skribis al S-ro Dro Joao Marques dos Reis, prezidanto de la

Brazila Banko kaj eksministro por Trafiko kaj Publikaj Laboroj, longan leteron kun la peto, ke li estu apud S-ro D-ro Gustavo Capanema, Ministro de Edukado, patrono de alvoko de B. L. E. al la Brazila Registaro, por ke ĝi subskribu la Lernejan Interŝtatan Akordon por la samtempa deviga enkonduko de Esperanto en la lernejojn de pluraj ŝtatoj. Dro Marques dos Reis transdonis al la Ministro de Edukado tiun leteron, akompanatan de dokumentoj pri la progresoj de Esperanto kaj de sia letero, per kiu li petis lian specialan komplezon simpatie kaj bonvoleme ekzameni la eblecon plenumi la aspiron de B. L. E. Li aldonis, ke kiam li estis ministro de trafiko, li sukcesis kun decida apogo de lia noŝto D-ro Getulio Vargas eldoni poŝtmarkon, kiel memorigon de la Orjubilea Kongreso de Esperanto.

Ricevinte tiun ĉi leteron, Dro Capanema respondis al Dro Marques dos Reis, sciigante lin, ke li simpatie ekzamenos la alvokon de la Ligo, kies leteron li tuj sendis al Departamento de Edukado. En sia raporto adresita al ties Direktoro, Dro Mario Brito, S-ro Oktavio Martens, edukada teknikisto, diris jene: Estas nediskutebla la utileco de internacia lingvo, precipe kiam ĝi prezentas la karakterizaĵon de Esperanto: la grama-

tika simpleco kaj la vortareto el internacia bazo, kiu garantias la facilecon de ĝia uzado por ĉiuj popoloj. Tial mi opinias esti konvena la aliĝo de Brazilo al la preparolata akordo.

Krom tio S-ro Ministro deziris aŭdi kompetentan opinion de la Nacia Konsilistaro de Edukado, kiu konsistas el 15 kompetentuloj. Por faciligi ilian laboron B. L. E. sendis propagandilojn de Esperanto al ĉiuj konsilistoj. La 12 de novembro, ĝuste kiam oni festis la 20 datrevenon de la batalhalto, d-ro Jonathas Serrano, elektita de la Prezidanto kiel raportonto, legis sian raporton, kiun li per konvinkaj vortoj brilege defendis. D-ro J. Serrano, al kiu la propagando de Esperanto en Brazilo multe ŝuldis, kiam li estis teknika direktoro de Publika Instruado finis sian paroladon, montrante al siaj kunuloj la bildon de la Stando de Esperanto ĉe la Internacia Filateliekspozicio ĵus okazinta en Rio de Janeiro. La rezulto de la voĉdonado superis la plej optimisman probablecon. Dekdu konsilantoj voĉdonis por la konkludo de la raportinto kaj nur unu voĉdonis kontraŭ. S-ro Edgard Rena-

ult, la nova Direktoro de la departemento de l' edukado, kiu ĉeestis la kunsidon, sed ne voĉdonrajtis, elmontris sian simpatian por Esperanto.

Jen la teksto de la konkludo: Komisiono pri Instruado. Raporto n-ro 299. Temo: Enkonduko de Esperanto en la lernejojn. Konkludo: La Komisiono pri duagrada instruado opinias, ke oni devas akcepti la alvokon de Brazila Ligo Esperantista, por ke Brazilo donu sian aliĝon al la Lerneja Interŝtata Akordo, kies teksto estas en la manoj de la Ĝenerala Sekretario de la Ligo de Nacioj en Genevo; kaj por tiu celo la kompetentaj organoj devas fari la necesajn paŝojn kaj la oficialajn komunikojn. Rio de Janeiro 9/11 38 (Subskr.) Jonathas Serrano, raportinto.

En la lasta n-ro de P. E. ni publikigis la nomojn de la Konsilistoj, kiuj aprobis la konkludon de la raporto.

Mi devas aldoni, ke post la Jubilea Kongreso la Komisiono de P. E. D. prilaboris la raporton kaj sendis ĝin al diversaj registaroj.

O. Bujwid.

RESPONDO AL TRE ESTIMATA SAMIDEANO O. B.

La nuna mondo estas malbona, malbela, neanta la plej sanktajn rajtojn de la individuo, perforanta la korpojn kaj la animojn, fabrikanta inferajn maŝinojn por legi la plej sekretajn pensojn de l'homo. Ĝi ne nur celas detruon de la civitanaj rajtoj de la individuo, sed neniigi la individuon mem. Malfacile estus tion ne konstati kaj pli malfacile estus iel konsoli sin pro tio, ke oni travivas tiajn tempojn. Sed ni memoru tamen, ke antaŭ ol eksplodi por superŝuti ĉion cirkauantan per bolanta lafo, la vulkano longe grumblas, minacas, kaj eĉ atakas. Tiu lafo malpurigas, neniigas ĉion, kion ĝi atingas. Sed poste, dum longa tempo, la vulkano restas kvietita, silenta. Dum tiu tempopaco la homoj purigas la kampojn lafokovritajn, rekonstruas la domojn, retrovas siajn kampojn kaj rekomencas sian kvietan kaj laboreman vivon.

Longajn jarojn ni vivas jam sur tiu eksplodanta vulkano, konstante minacanta kaj ne-

niiganta, superŝutanta la homojn per brulanta koto, pleniganta la orelojn per ĝemkrioj homaj: viraj, virinaj kaj infanaj! Sed iafoje ega malbono naskas bonon! La mondo estas sufiĉe vasta por enloĝigi ĉiujn diajn kreitaĵojn bonvolemajn. Ni esperu finon de tiu epoko plena de malfeliĉoj kaj ekbrilon de tiu nova, kiu radios en la mond'. Se ni, la edukitoj kaj produktaĵoj de la 19-a jarcento, ne vidos ĝin, niaj kunlaborantoj naskiĝintaj kaj edukitaj dum la 20-a povas ĝoji, ĉar ili ĝin vidos. Ili prepariĝu al ĝia plena ĝuo! Al ni neniel helpas plendoj kaj ĝemoj, ni devas nur agi, agadi senĉese por akceli la alvenon de tiu epoko benata, kiu ne atendigos sin pli ol dudekon da jaroj, eble eĉ multe malpli!

Plene konsciaj, ke ni ne laboras por nia propra feliĉo, ni serĉu nian feliĉon en nia laboro. Kaj nin ne timigu la noktaj aŭ inferaj potenco!

„Ar Mor“.

INTERŜTATA ESPERANTO AKORDO. KOMITATOJ DE PROTEKTANTOJ DE IEAK. KONGRESA AGADO.

Postaŭgustaj agadoj kaj senbaza defetismo.

Post la julia raporto de IEAK-komisiono ekregis pri IEAK silento. La kaŭzo estis tre

simpla: la septembro-oktobraj politikaj gravaj okazintaĵoj tiel fortiris la atenton pri ĉiuj aliaj problemoj, ke plua agado dum tiuj ĉi du kaj eĉ pliaj monatoj estus simpla »kri-

ado en la dezerto». Estas krome en esp. vicoj malgrand-animaj semantoj de defetismo kiuj grakas, ke jam nenio plu en kuranta momento estas farebla. Al ili mi respondus: iu homo ne scianta, ke la vintron sekvas la printempo povus, rigardante vintran detruon de la naturo, antaŭprofetadi al la loĝantaro la morton pro malsato. Ni tamen ĉiuj scias, ke tio ĉi estas sanbaza: post detrua vintro venas kun fera neceseco la verdiganta printempo... la printempo de la popoloj.

Ni ne kaŝis en nia lasta resuma komuniko antaŭ la londona kongreso, ke la situacio politika estas malfacila por ion grandskale fari. Aliflanke ni provu nenion daŭrigi kaj post bone kaj bele komencita laboro ni ĝisvivos la kompletan velkiĝon de ĉiuj niaj preĵaroj. Do necesa estas plua laboro malgraŭ malfacilaĵoj, kiuj cetere eterne ne daŭros.

Instigilo por la realigo de IEAK.

Estas multfoje konstatebla fakto, ke diversaj ideoj malgraŭ kompleta preparo ne sukcesis ĝis ili ne ricevis iun politikan aŭ alian fortan instigilon. Ekzemple la sendependeco de Polujo kaj de aliaj ŝtatoj antaŭ la jaro 1914 povus esti ideo pure dialektika. Necesa estis fino de granda milito en 1914 kaj la ideo ĝis nun por multaj ne atendata subite aktualiĝis. La samo estas konstatebla pri aliaj ideoj.

Kio estos la instigilo (politika?), kiu subite aktualigos IEAKon, mi ne scias. Kuranta milita kaj antaŭmilita tintado, kompreneble, ne estas favora por ĝi. Sed se io aktualigus IEAKon, IEAK tamen ne realiĝus, se por ĝi ne estus preparita la grundo.

Manko de ĝisnuna agado pri IEAK.

Ne ripetante la enhavon de nia lasta komuniko, sed resumante ĉion mallonge, kion ni ĝis nun spertis, ni devas konstati, ke: 1) la ideo pri IEAK estas sufiĉe popularigita, 2) sed oni ne volas ofte riski proponon ĉe la koncernaj registaroj, ke ili aliĝu al IEAK, ĉar oni timas la rifuzon, post kiu la propono ne rapide estus ripetebla. Por ne ricevi la rifuzon, oni ne petas. La sintenado do estas tre singardema, oni per ĝi nenion perdas (certe!), sed samtempe ankaŭ nenion gajnas. Ĝi pravas malfortecon. Se en politika vivo oni refuzas la postulon de iu partio, aŭ de iu konfesio, tio ĉi minacas, ke eksplodos parlamenta obstrukcio. Se oni al esperantistoj rifuzus la realigon de iliaj postuloj, tio ĉi kaŭzus neniajn skuojn en la socio.

Vojo al la forto kaj influo.

Bonvolu dum iu momento pripensi pri niaj postuloj, sed tiel, kiel ili aperas al iuj aŭtoritatuloj ŝtataj: venas al ili esperantistoj, kiuj kvazaŭ iu komercisto diras fiere: »nur niaj varoj estas la plej bonaj«. Aŭtoritatulo nenion, aŭ malmulte sciante pri esperanto, demandas sin en la silento de la koro: kiu subtenas en la socio tiun ĉi proponon de esperantistoj, ... kiu krom ili? Neniu! Do la postulo estas nur la postulo de esperantistoj kaj de neniu plu, sekve postulo ne subtenata de iu organizita forto socia. Jen la kaŭzo de fakta, aŭ antaŭvidebla malsukceso de la postuloj pri IEAK!

Ni do kreu tiun ĉi forton!

Komitatoj de subtenantoj de la ideo pri IEAK.

Ciun novan ideon devas iu subteni, protekti, se oni volas, ke la ideo enpenetru grandajn amasojn. Do, ni en ĉiu ŝtato kreu la komitatojn de subtenantoj, konsistantajn ne nur de esperantistoj, ĉar tio ĉi estas memkomprenebla, ke esperantistoj subtenas esperantismon, kiel ekz. angloj subtenas ĉion anglan, sed ankaŭ de aliaj personoj, kiuj, kvankam ne esperantistoj, tamen opinias, ke la ideo pri esperantismo estas subteninda. Tiel, veninte al iu ministro kaj estante demanditaj, kiu nin en la socio subtenas, ni povos respondi: jen la listo de protektantoj! ni ne estas solaj.

Subtenantoj povas esti diversaj: komercistoj, sciencistoj kaj aliaj fakuloj. Sed kiu antaŭ ĉio? Mi opinias, ke ĉio dependas de lokaj kondiĉoj en ĉiu lando. Mi tamen preferus organizi antaŭ ĉio sciencistojn, profesorojn de altaj lernejoj en ĉiuj landoj, kiuj deklarus: »mi subtenas ideon pri lerneja IEAK, celanta samtempan enkondukon devigan de esperanto en la lernejojn de la lando, se 6 ŝtatoj pri la samo konsentos. Tiujn ĉi voĉojn oni povus poste elprofiti enlande kaj internacie. Tio ĉi estas »la Komitatoj de protektantoj de IEAK«.

Agadoj en internaciaj kongresoj.

Simile oni devas klopodi pri la agado dum la kongresoj internaciaj, diverslingvaj laŭ du planoj: a) prepara plano. Oni kolektas subskribojn, ke estu dum la kongreso permesate proponi al la kongresanoj la rezolucion: »La Kongreso subtenas ideon pri IEAK kaj alvokas la kongresanojn organizi enlandajn komitatojn por ĝin subteni, b) dum kongresa agado: tiun ĉi rezolucion oni proponas dum la kongreso por la voĉdonado kaj poste por la ekzekutivo.

Sed por bone organizi tiun ĉi agadon, nepre estas necesa speciala oficisto porkongresa en niaj ĉefaj organizoj esperantaj UEA kaj IEL.

Jen kio estas farebla eĉ malgraŭ pace malfavoraj tempoj. Ni klopodu ĉion prepari por la estonta rikolto. Kiam ĝi okazos -- ni momente ankoraŭ ne scias, sed ĝi certe okazos. Ni do estu preparitaj. La

vintro ne daŭros eterne. Venos tamen iam la printempo de la popoloj.

Laŭ lastmomente ricevita sciigoj la brazilaj samideanoj, agantaj modele, multe sukcesis. Plenajn gratulojn al ili! La tuta mondo esperantista admiras ilin kaj provu fari la samon, ĉiu en sia lando, laŭ ebleco de kuranta momento kaj malfacilaj cirkonstancoj. *Dr Antoni Czubyński.*

ARTIKOLO RICEVITA EL ITALIO:

ROMO DE LA TEMPO DE MUSSOLINI.

Kiam la arto naŭcenta unuafoje aperis en Italujo per la trans-Alpaj arkitekturaj revuoj -- precipe de Germanujo kaj de Ameriko -- oni kriis pri honto. La plej maljunaj, kaj ankoraŭ ne estis tiaj, pri difektiĝo de la gusto, pri perdiĝo de estetika sento. Kaj kiam la unuaj projektoj de la unuaj konstruaĵoj, starigotaj laŭ la novaj reguloj, estis liverataj al la publika scivolemo, ĥoro de indigno sin ĵetis kontraŭ la koncepta malriĉeco kaj la senkapableco de efektivigo de la moderna generacio.

Malgraŭ la Granda Milito, malgraŭ senfinaj egaligaj kaŭzoj, la itala popolo, aristokrata kaj konservema pro sia naturo, sentis ankoraŭ tro multe la influon de la intenca artifiko de la XIX-a jarcento.

Kaj el ĉiuj urboj, kiuj en ĉiuj italaj regionoj sentis la influon de la nova arto, Romo vekis la plej akrajn protestojn de la pasintŝatantoj, indignintaj precipe, ĉar ili vidas inaŭgurita tiun barbaran arton en sia tute klasika urbo.

Romo, laŭ ies kriterio, estus devinta resti eterne la simbolo de forpasinta civilizo, kaj pro tio ĉiam prezenti al la mondo la akran kontraston de la ŝimaj domaĉoj kuŝantaj apud la reĝa majesteco de la palacoj de la XV-a jarcento kaj de la Renesanco, senutilaj ĉeestantoj de la ruiniĝo de la monumentoj pli antikvaj.

Kaj sendube la amantoj de l'harmonio vere ne kapablis imagi monotonan saksan domegon aŭ pezan novjorkan nubskrapaĵon flanke de la riĉega aristokrateco de la palacoj de l' XVIII-a jarcento aŭ kontraŭ la dia fono de kupolo de Michelangelo.

Tiuj samaj estetikuloj hodiaŭ krias pri miraklo, admirante la perfektan kunfandon, kiun la itala genio kapablis realigi inter la antikvo, la novklasiko kaj la naŭcento.

La tre simpla naŭcento, liberigita de tro rigida liniismo, riĉigita de la marmoraj kompaktaĵoj, dekorita per la multkolora paletro de la ĉielo kaj de la ĝardenoj de Italujo, amalgamiĝis kun la karaktero de pureco kaj de klasikismo, kiu dominas en ĉiuj kon-

struaĵoj atestantaj la artan pasintecon de Romo.

Kaj neniuj arkitekturo, de kiam la jarcentoj amasigis artajn trezorojn apud la Koloseo kaj la Forumoj, kontraŭ la fono de la Akveduktoj, sukcesis interfratiĝi kun la antikva majesteco, kiel ĉi tiu tiel pridiskutita naŭcento, kiu kapablis konservi sendifekte la harmonion de l'ritmo kaj de l'estetika tono.

Eĉ preskaŭ ŝajnas, ke la glorioj de l'pasinteco gajnis per la nova kadro, kiun nova Romo prezentas kiel spektaklon de l'antikva kaj nova Imperio.

La krea ŝanĝebleco de la italoj tiamaniere kapablis submeti al siaj celoj la senforman materion enportitan de trans la landlimo.

Kaj jen stariĝas en la Circo Massimo, sub la ombro de la skeleta Palaco de la Cezaroj, la naŭcentismo trudita de la industriaĵoj postuloj de la aŭtarkiaj ekspozicioj, novaj simboloj pri la renaskiĝinta grandeco.

La sama naŭcento, sentita kun pli da klasikismo, gastigas en sia sino la tutan brilan parabolon de la roma mondo en la ejoj de l' Aŭgustus'a Ekspozicio.

Kaj unu konstruaĵon post la alia, la nova arkitekturo apudigis al la antikva, ne por ĝin detrui kaj difekti kiel la konstruaj metodoj uzitaj en pasintaj tempoj, sed por doni novan lumon al la antikvo, preskaŭ rekreante ĝin en nova atmosfero inda je la brila pasinteco.

La jaroj forpasis: el la malnova Romo hodiaŭ tre malmulte restas, sed tio, kio restas, estas la perfekta atesto pri nia nuna grandeco. Kaj apud ĉi tiu renovigita brilo jen naskiĝas nova urbo, kreita de la plej proksimaj postuloj de la ĉiutaga, agema vivo. Antikvan Romon oni respektegas kaj oni amas, sed en la alia, kiu tagon post tago kreskas kaj vastiĝas laŭ la ĉiam pliiĝintaj necesoj de nia popolo, oni ĝuas la vivon travivitan harmonie, trankvile, serene.

Kie trovi, en aliaj landoj, en aliaj urboj, la logon de la florantaj romaj kvartaloj?

Spegule de la majesta trankvileco de la Tibro, en gaja multkolora de marmoroj,

la novaj palacoj stariĝas unu post la alia, unu pli bela ol la alia. Malgraŭ la linia simpleco de la konturoj, la konstruaĵoj kompletigas unu la alian. La balkonoj, vastaj kiel terasoj, en la varma lumeco de la romaj matenoj, purpuriĝas pro kolorstrekoj de geranioj, ĉarmiĝas printempe kaj aŭtune pro la densa ombro siringokolora de la glicinioj. La riĉeco de la marmoraj muroj sub la varma kiso de la suno refraktiĝas laŭ delikateco de lumoj kaj de tonoj, kiu preskaŭ antaŭanoncas la simplan rafinitan klarecon de la internoj.

La topografia aspekto de la nova urbo tuj pruvas al la vizitanto, ke la Romano sin sentas kaj scias esti la mastro de la plej bela kaj plej fruktodona tero. Fakte en ĉi tiu metropolo, kiu ĉiutage prosperas iom pli multe, nenio estas mizera, malnobla, sufo-kita.

Vagadi laŭ tiuj stratoj signifas spiri antaŭ la plej malavara naturo. Ĉar la mirinda

mistero de Romo konsistas en tio: ke ĝi sukcesis konservi eĉ en la kvartaloj plej evoluigintaj kaj modernaj la grandiozan majestecon de la trankvila roma kamparo, kiu ĝis pasinteco sufiĉe proksima konsternis nian konsciencon de revantoj.

Eĉ tio, kio ekzistas plej nova en Romo, entenas eron da senmorteco kaj da dieco!

Vastaj placoj, larĝaj stratoj plenaj de florantaj mimozoj, oleandroj, kratagoj, malheligitaj pro la ombro severa de la cipresoj aŭ distaŭzita de la platanoj. La brilo mem de la luksaj aŭtomobiloj, de la tramoj kaj de la dratbusoj, ne kapablas ĝeni la trankvilan harmonion de la tuto.

Kaj Romo majesta kaj forta estas hodiaŭ la nura urbo, kiu kapablis enfermi en sia sino la freŝan riĉecon de la naturo, kaj kiu kapablis kunfandiĝi kun ĝi por krei novan mirindaĵon en la Arthistorio: Romon de la tempo de Mussolini.

DU BETULOJ.

*Ĉe fenestro mia
Du betuloj ploras,
Pri somer' pasinta
lli rememoras.*

*Branĉojn senfoliajn
Teren klinas vento.
Tremas blankulinoj
Pro dolora sento.*

*Longe dum la nokto
Ŝajnas al infanoj,
Kvazaŭ iu frapas
Per ostecaj manoj.*

*Kvietiĝu! Dormu,
Etaĵ petoluloj,
Ĉe fenestro nia
Ploras du betuloj.*

MI KAJ GRUOJ.

*Atendu, atendu min, gruoj!
Ja kial vi tiel rapidas?
Ĉu pelas vin noktaj nebuloj?
— Jam nudas ĉe lago betuloj
Kaj vento en fendoj mokridas.*

*Atendu, atendu min, gruoj!
— Malfruis ci. Vanas jam petoj.
For vokas nin la sopirsento
Al riĉa je sun' oriento,
Al lando de mil minaretoj.*

*Atendu, atendu... kaj orfa
Mi paŝas al blinda kabano.
Leviĝas el marĉo nebuloj,
Fantomas blanktrunkaj betuloj,
Sed mi revas pri... pelikano.*

Ludmila Jevsejeva.

DIGNE...

Unutone, melankolie frapis sur reloj radoj de malproksimen kuranta vagonaro. Ĉefervoaj telefonaj kolonoj, unuopaj arboj kaj tie kaj ĉi tie, kvazaŭ disĵetitaj malgrandaj, vilaĝaj kabanetoj, prilumataj de pala, malĝoja aŭtuna sunlumo, ŝajnis kun ia kapturita rapideco forkuradi returnen. Super dezertaj kampoj pendis... melankolio kaj malĝojo de malfrua aŭtuno...

Unutone, obtuze krakadas la radoj... ra-

pide, rapidege kuregas vagonaro... antaŭen.. en nekonatan malproksimon...

.

En kupeo de tria klaso, rigardante tra duonmalfermita fenestro la rekurantajn vojobjektojn sidis du personoj: ia 24 aŭ 25-jara junulo kaj gravmiena, mezkreska, larĝvizaĝa, komercistaspekta sinjoro.

Ĉiu, kiu enirus la kupeon kaj observus

tiun duopon, ekpensus tuj, ke tiuj du homoj estas al si fremdaj, nekonataj... ke sorto de unu estas por alia tute indiferenta. Sed tiu iu, pli bone observante la du vizaĝojn, devus rimarki profundan malĝojon de la junulo kaj esprimon de plena kontento pro l'vivo sur larĝa vizaĝo de la komercistaspekta sinjoro.

Pardonu, sinjoro... ke mi interrompos vian pensadon, — ekdiris subite la supozebla komercisto, turniĝante al la junulo, sed mi malgraŭvole observis vian malĝojon, kies kaŭzoj, laŭ mia konsidero, devas esti gravaj. Mi scias, ke nekonvena estas mia scivolemo kaj sinaltrudo al via persono, sed mi de komenco de nia vojaĝo rimarkis vian deprimoplenan animstaton, do mi opinias, ke vi pardonos al mi mian... hm.. eble mi povus konsili, aŭ...

Via procedo rilate min ja ne estas ia neĝusta — respondis afable, sed kun videbla malĝojo la junulo — mi eĉ kontentas, ke mi povos al iu ajn malkaŝi kaŭzojn de mia malĝojo... sed mi estas ja tute fremda al vi, ni interkonatiĝu... mi estas S. — K... respondis la sinjoro, ĝentile levante la ĉapelon kaj premante la manojn de S. — mi estus vere tre kontenta, se mi povus al vi... helpi en via malfeliĉo, se mi rajtas tiel diri.

Mi veturas Bobrujskon, al gepatra hejmo, kie atendas min malĝoja, treege malĝoja momento... hieraŭ vespere mi ricevis telegramon, per kiu oni avizis min pri subita morto de mia patro. Kaj jen mi veturas por ĉeesti funebran ceremonion de enterigo, mi...

Pardonu, ke mi interrompas al vi, mi komprenas vian doloron kaj vian malesperon, sed tio ankoraŭ ne povas signifi, ke vi falu en tioman melankolion; nu, mi komprenas... patro... sed tio ne devus esti ĉefkaŭzo.

Ah, estimata sinjoro, al tiu malfeliĉo aliĝas ankaŭ multaj aliaj... mi... ah!... damninda sorto ia fatala destino min persekutas... imagu, hieraŭ preskaŭ samtempe en momento de ricevo de la terura telegramo, mi ricevis avizon, ke mi ne plu alvenu oficejon, ĉar mian lokon okupas nun aliulo, pli praktika ol mi kaj pli klera. Oni torpelis min sen antaŭsciigo, sen pli gravaj kaŭzoj... kiel hundon... mi restas sen iaj ajn vivrimedoj kaj tie atendas min malfeliĉa patrino kun sepopo da malgrandaj infanoj...

Ĉu mi povus scii, kie vi servis?

Mi estis librotenisto en urba kooperativo en D... mi neniam estis antagonisma kontraŭ diversaj, ofte iom tro strangaj postuloj de miaj ĉefuloj, postulantaj de mi nefoje

plenumadon de devoj, kiuj — laŭ mia ofico — tute ne apartenis al mi. Mi ĉiam ja obeis ilin, mi ĉiam zorgis plenumi miajn devojn, kiel eble plej bone... sed tia mia sorto.

Do, mi tre ĝojas, ke mi povos helpi al vi, sinjoro S. Mi estas posedanto de granda peltvendejo en E. kaj mi jam delonge serĉas iun bonan libroteniston, sen kiu mi nenion scias pri prosperado de mia entrepreno. La sorto mem sendas vin...

Ho dankon, plej koran dankon, estimata sinjoro kaj savanto mia! ekvokis kun ĝojlarmoj en okuloj premante la manojn de la komercisto, la nekutime emociita junulo. Vi portas al mi savon vi estas mia... sed, ho, kiel mi dankos al vi? Kiel mi povos?

Ne valoras, ne valoras... mi vere kontent- (tas, ke mi povas fari por vi tiun kompleteton. Vi ricevos apartan ĉambron, maten- tag- kaj vespermanĝojn kaj 200 zlotojn de monata salajro. Ĉu je komenco sufiĉas?

Sinjoro... bonfaranto... mi ne trovas la vortojn por esprimo de miaj dankosentoj, mi tutan vivon preĝos.

Nu, lasu jam, lasu... — kun boneca rideto interrompis la komercisto; post enterigo de la patro tuj alveturu al E... jen mia adreso... sed kion jen vi portas sur renversaĵo? — la komercisto subite kliniĝis super vestaĵo de la junulo. Kion signifas tiu ĉi insigno?

Tio estas kvinpinta verda stelo, la signo de Espero kaj Frateco! — ekvokis fervore kun digno la emociplena junulo — mi estas esperantisto! — ripetis plenvoĉe — kaj mi fieras, ke mi estas adepto de mirakla ideo... ke mi povas paroli belan lingvon de geniulo... ke mi rajtas porti la insignon!...

Sinjoro S. — reparolis iel strange la komercisto — mi tre ne ŝatas fanatikulojn, mi ne kredas utopiojn kaj elpensadojn de malsanaj cerboj! Mi konas tutan aferon pri tiu via esperanto, ĝi estas elpensado de biolistoka judo, ĝi estas ia balbuteca ĵargono, (plej granda sensencaĵo... sen plej eta logiko kaj evolupovo. Kaj ĝia tuta ideo tro malbonodoraĉas per komunismo. Vi tre plaĉas al mi kaj mi tre ĝojas, ke mi povas helpi al vi en via peza situacio, sed nun mi povas tion fari al vi nur sub tiu kondiĉo: vi forĵetos tiun ĉi komunistan stelon kaj forlasos la malsaĝaĵon ĝi ja estas rid...

Li ne finis. Kun esprimo de neparolebla malestimo en brilplenaj okuloj, nenion dirinte, la profundanime ofendita junulo eliris senvorte el la kupeo.

Malsaĝulo... flustris la larĝvizaĝa sinjoro kaj ekmovinte la brakojn reokupis sian sidlokon.

Eugeniusz Matwiejczuk.

XXXI-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Bern, 29-a julio — 5-a aŭgusto 1939

Tria informilo

Adreso por leteroj: 31a Universala Kongreso de Esperanto, Bern.

Reprezentanto en Polujo: IEL—ĉefdelegito S-ro M. Chmieliński, ul. Krasińskiego 4, Toruń.

Kotizoj: Ĝis 31. 3. 39: 35.— zł. Post 31. 3. 39: 42.— zł. La edzo aŭ edzino de kongresano, same gejunuloj ne pli ol 20 jaraj pagas la duonon de tiu sumo. Plej oportune vi pagas al la supre menciita adreso de nia pola reprezentanto S-ro Chmieliński. Poŝta konto Nr 203.616.

Aliĝiloj estas haveblaj ĉe la landa asocio kaj ĉe la landa reprezentanto.

Blinduloj kaj ties gvidantoj ricevos senpagajn kongreskartojn, ĝis la 31a de marto 1939. Post tiu dato ili pagos po 5 sv. fr. por esti kongresano. Ili devas sendi ateston ke ili estas blindaj, subskribita aŭ de IEL delegito, aŭ de Blindula Instituto, aŭ de kuracisto.

Glumarkoj, bona propagandilo, 100 pecoj kostas sv. fr. 1.20 aŭ 4 respondkuponojn.

Donacoj helpas sukcesigi la kongreson, la organiza komitato antaŭdankas al donacantoj.

Blindula kaso, helpu ebligi al blinduloj la

kongresviziton, la komitato danke akceptas donacojn por tiu kaso.

Loĝado kaj manĝado, vidu la favorajn aranĝojn sur paĝo 151 de Pola Esperantisto Nr 11 de 1938.

Fakaj kunvenoj, organizontoj frutempe anoncu siajn dezirojn. Ĝis nun sin anoncis: Internacia Ligo de Esperantistaj Poŝt-kaj Telegraf-oficistoj. Internacia Scienca Asocio Esperantista. Kristana Esperantista Ligo Internacia. Turista fako de Nederlanda Esperanto-Asocio „L. E. E. N.“ Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj.

Skolta tendaro. En la 31a UK okazos ankaŭ la skolta tendaro 1939. Informojn petu de la fakdelegito por skoltismo: F-ino G. Merz, Falkenweg 9, Bern.

Oficiala kongresgazeto estas „Ni vokas vin“. Ĉiu kongresano ĝin ricevas senpage. Antaŭvidata estas ok numeroj, la lasta enhavos la raporton pri la kongreso. La du unuaj numeroj estas multnombre forsendataj kiel varbnumeroj, interesuloj petu ilin de la kongres-oficejo. La proksima numero aperos fine de marto.

Aliĝoj: Ĝis 12. 1. 1939 aliĝis 391 el 19 landoj.

La Prezidanto: *H. Buchli*

KOMUNIKO DE P. E. D.

Ni ankoraŭfoje insiste petas ĉiujn (sensespte!) E-grupojn pri respondo je nia alvoko en n-ro 10. de P. E. Ni alvokas al kunlaboro! Sendu mallongajn raportojn de via grupa laboro.

„KVINMIL — FONDO“.

Pluaj pagoj por la „Kvinmil-Fondo“:

T. Kaciczak, Zakopane	zł 2.—
Pola Esp. Asocio, Toruń	„ 1.85
M. Grodzki	„	„ 1.—
I. Dziedzic	„	„ 1.—
M. Chmieliński	„	„ 1.—
Z. Seyda	„	„ 1.—

KOMUNIKO DE I. E. L.

La ĉefdelegito de IEL sciigas, ke por jaro 1939 validas jenaj kotizoj: MJ — 4 zł, MA 11 zł, MAH — 24 zł, MS — 30 zł, jarlibro 1938 — 2 zł. Ĉiu novaliĝanto ricevos suple-

menton de jarlibro 1938. La kotizoj estas pageblaj je poŝtĉeka konto P. K. O. 203616. Depost 1-a de januaro monata organo „Esperanto Internacia“ aperadas en libra formato 15×22.5 cm -- 32 paĝoj.

Samideanoj! rapidu aliĝi kaj realiĝi, precipe MA kaj MAH, ĉar la organoj estos liverataj nur ĝis februaro. IEL havas delegitojn kaj fakdelegitojn en jenaj lokoj: Będzin, Biała Podlaska, Bielsko, Brody, Bydgoszcz, Chełmno, Cieszyn, Katowice, Kowel, Kraków, Lublin, Lwów, Łuck, Mława, Nowy Targ, Płock, Poznań, Święciany, Tarnów, Toruń, Warszawa, Wilno, Wiśniowiec kaj Zgierz. Kiu do volas iĝi delegito en alia loko rapidu kun aliĝo por esti presita en jarlibro 1939 aperonta en marto.

Kotizoj por kongreso en Bern estas: 35 zł ĝis 31 III kaj 42 zł poste. 50 pecoj de glumarkoj kostas 85 gr. Por sendo de nro 1 de kongresa gazeto sendu 15 gr aŭ poŝtmarkon ev. poŝtkarton. Mi liveras kongre-

saligilojn. Suprajn pagojn kaj ankaŭ porloĝejajn oni pagu je PKO. 203616. (Porloĝejaj pagoj en decembra n-ro de P. E.).

inĝ. M. Chmieliński

Toruń, Krasińskiego 4.

Ni recevis jenan alvokon:

Al

**Esperantaj Societoj, Esperantistoj
en Polujo**

Tre Estimata(j) Samideanoj(j):

Estas konata fakto, ke radio plej bone povas servi por disvastiĝo de Esperanto. Dum la lasta tempo kun ĝojo oni povas konstati, ke multaj radiostacioj en la tuta mondo praktike uzas Esperanton dum la plej diversaj disaŭdigoj. Bedaŭrinde, nur la „Pola Radio“ malatentas la gravan signifon de Esperanto kaj eĉ ĉesigis disaŭdigi prelegojn

en Esperanto pri Polujo, kiuj rikoltis grandan sukceson eksterlande.

Varsovia Esperantista Societo intencas prezenti al Direkcio de „Pola Radio“ konforman petskribon vaste dokumentitan pri apliko de Esperanto en radio, petante disaŭdigi en kaj pri Esperanto. Sed estas necesa forta subteno flanke de radioabonantoj kaj radioaŭskultantoj. Tial Varsovia Esperantista Societo presigis specialajn foliojn por kolektigi la subskribojn.

Energie kaj zorge kolektu la subskribojn kaj la foliojn resendu al Varsovia Esperantista Societo, Warszawa, Leszno 56/9.

Memoru, ke nur de via bonvola subteno dependas la sukceso de nia agado!

Kun samideanaj salutoj!

Estraro de Varsovia Esperantista Societo.

La foliojn vi povas senpage ricevi ankaŭ ĉe Pollanda Esper. Deligitaro (P. E. D.), Kraków, Lubicz 34.

BIBLIOGRAFI O.

RECENZOJ.

El Litova Poezio. Tradukis kaj kolektis **P. Lapienė.** 200 paĝ. Prezo 0,5 us. dol. Havebla ĉe Litova Esp. As. Zemaiciu 15, Kaunas, Litovujo.

Litovujo renaskiĝis. Ĝi festis antaŭ ne longe la 20-jaron de novezkisto. Popolaj litovaj kantoj estis jam delonge buŝe transdonataj, sed la skriba poezio komenciĝis de Duonelaitis meze de XVIII jarcento (1714—1780). Ĝis tiu tempo estis en Litovujo nur pure praktika literaturo: katehismoj, gramatikoj, vortaroj, religiaj kantaroj. La poeto estis protestanta pastro en Orienta Prusujo en komenco de XVI jarcento ankoraŭ tute litova regiono, nun jam germana. Ankoraŭ meze de XVIII jarcento en paroĥo de Duonelaitis duono de la loĝantaro estis litovoj. Duonelaitis estis tute sola en la poezia kampo. La vera literatura movado aperas en la komenco de XIX jarcento kaj ĝi koncentriĝas ĉirkaŭ la Vilna Universitato. La partoprenantoj de tiu ĉi movado brulis per fajro de patroamo. Ili ĉiuj sentis la doloran dispartigon de 1795, dum kiu pereis la sendependeco de Litovujo kaj Polujo. La ĉefaj poetoj de tiu periodo estis Dionizas Foska, Simanas Stanevicius, Silvestras Valjunas. Flanke de la movado, estigita de la Vilna universitato, staris Antana Stradelis (1763—1863). Post la centjaro li vivas ankoraŭ en la memoro de litova popola.

Menciindaj estas ankaŭ pliaj poetoj, ekz. Ant. Baranauskas.

El lia profeta poeziaĵo ni citos kelkajn versojn:

Nun la rusoj kun moskvidoj moskve mastumadas
kaj de Litovuj' infanojn la mizer' premadas.
Nek la preson nek la librojn ili al ni donas.

Venos iam temp' de l'gentoj kaj la ter' rompiĝos
Mallumiĝos lum' de l'mondo, nia eklumiĝos.
Falos montoj, malaltaĵoj supren sin eklevos,
Malfortul' potenca estos, potenculoj krevos.

Ni ne povas citi ĉi tie la nomojn de ĉiuj poetoj, kies nomoj estis kolektitaj de aŭtoro de antaŭparolo Antanas Vaiciulaitis. La leganto serĉu mem en la interesa artikolo de l'aŭtoro detalojn. Nova periodo de literaturo komenciĝas en 1904, kiam la litovoj ricevis la presliberecon, kiun ili ne havis dum 40 jaroj: la rusa registaro malpermesis ja la presadon de litovaj libroj per latina alfabeto dezirante altrudi la rusan. Litovoj ĝin ne akceptis, presadis eksterlande siajn librojn per latinaj literoj, kaŝe venigadis kaj disvastigadis ilin, ĝis ili reakiris siajn rajtojn.

Post 1918, kiam Litovujo rericevis la liberecon, montriĝis la vigla kresko de litova literaturo.

Kiu volas ekkoni veran senton de tiu ĉi

malnova eŭropa popolo, kies lingvo similas al sanskrito kaj devenas el ĝi, nepre devas legi tre zorgeme de s-ano Lapiené kolektitajn versaĵojn. El ili oni povas ekkoni tre profundan mildan senton de litova popolo, tiom longe subjungita al fremda forto.

Libroj kaj presaĵoj ricevitaĵ:

Suplemento al la I. E. L. — libro 1939 entenas aldonojn kaj ŝanĝojn de la Delegitaro post apero de la Jarlibro 38.

Dro F. Erdey. Unua Eŭkaristia Esperanto-Mondkunveno. Budapeŝt 1938.

La penadoj de la kunprezidanto de la mondkunveno, D-ro Fr. Erdey, estas tre instruemaj por ĉiuj, kiuj estonte estos aranĝantoj de similaj esperantokunvenoj. De la komenco la preparantoj de la Mondkongreso ne volis aranĝi la Esperantan Eŭkaristian Mondkongreson. Oni evitis la malhelpojn, enkondunkante la vorton „Mondkunveno“ esperanta. La historio de la preparoj estas tiom interesa kaj instua, ke ni priskribos ĝin eble tute aparte. Nun ni aldonos nur, ke dank' al multaj malhelpaĵoj, oni ne povis atingi multenombrian kunvenon. Ĝi estis sufiĉe limigita.

Internacia Filatelio Ekspozicio Brapex.

En Rio de Janeiro, Brazilo.

Brazila Filatelio Klubo organizis ĝin de la 22 ĝis 30 oktobro. Ĝi estis oficialigita kaj subvenciita de la Brazila registaro kaj efektiviĝis sub la honora prezidanteco de la Prezidanto de la Respubliko d-ro Getulio Vargas. La inaŭguro esis solena kaj la sukceso grandega.

Ĝi okupis 14 salonojn de la Nacia Muzeo de belartoj sur la plej bela kaj tre moviĝema strato de la urbo Av. Rio Branco. Brazila Ligo Esp. aranĝis en unu el salonoj alian standon kun dudek kvadratmetraj bildoj, enhavantaj ekzemplerojn de gazetoj, flugfolioj, revuoj, prospektoj, poŝtkartoj, libroj de brazilaj aŭtoroj k. t. p. La Departemento de Poŝto kaj Telegrafo, kies direktoro estas kpt. d-ro Faria Lemos, eldonis belan poŝtmarkon kun la portreto de Rowland Hill, elpensinto de poŝtmarko, kreis tri stampilojn, kiuj per unu sola frapo faras multkoloran stampon. Unu el ili stampas la verdan stelon.

Oni vendis multajn poŝtkartojn kun teksto en esperanto. La Filatelista Kongreso aprobis la deziresprimon prezentitan de la samideano Benjamin Camozato, vicprezidanto de la Kongreso kaj delegito de BRAPEX en Rio Grande do Sul: La dua Brazila Filat. Kongreso donas sian tutan apogon al Esperanto, sugestinte, ke ĉe la Filatelio la internacia lingvo estu uzata ĉiam, kiam nur eble.

D-ro Clarence Herman el Usono kunportis 22 kolektojn de poŝtmarkoj. La pakaĵo estis asekurita je valoro de unu miliono da dolaroj.

Kiu sendos du poŝtajn respond-kuponojn al Brazila Ligo Esp. (Praça de Republica 54, Rio de Janeiro, Brazilo), tiu ricevos poŝtkarton kun la teksto en Esperanto, afrankitan per la memoriga poŝtmarko kaj stampitan per la stampo kun verda stelo.

Al d-ro Couto Fernandes la tuta Esperantistaro ŝuldas grandan dankon por la senlaca laboremo. La atingita sukceso estas grava paŝo antaŭen en la propagando de helpa internacia lingvo. O. B.

Geedziĝo. Izabella Melich el Kapostas, (Hungarujo) kun Manuel de Agrela Farinha, Madeira, (Portugalujo), je la 14 de januaro en Budapeŝt ĉe la Portugala Konsulo. Bondezirojn por la junaj gesamideanoj.

EL LA GAZETARO.

Esperanto Internacia, n-ro 2. Februaro. S-ro Gomes Braga parolas pri vigligita movado de Esp. en Brazilo. Antaŭ du jaroj ni havis neniun gazeton, neniun societon en aktiveco. Tomba silento envolvus nin. Nun tri, kvar gazetoj regule aperas, tipografia esperantista S. A. prosperas, novaj lernolibroj aperas kvaronjare, la neŭtrala gazetaro raportas favore. La eŭropa laboro plej utila por ni ĝis nun estas la libro, kaj espereble en proksima estonto ankaŭ la radioprogramoj el Eŭropo nin trafos kaj helpos.

Internacia Esp. konkurso en 1938 estis gajnita de la Svisa Esp. As.

Por ĉiu membro aliĝinta al IEL estas donataj poentoj laŭ jena tabelo:

Asocia membro	1
Membro kun jarlibro	5
Membro abonanto	10
M. Ab. Heroldo	12
M. subtenanto	15
Dumviva membro nova	50
Patrono	50
Entrepreno	10
Vendo de kuponlibreto	5

Oni notu, ke nun partoprenas en la konkurso nur landoj kun minimuma elirbazo de 250 poentoj. Sur la unua loko staras nun Argentino kun 309 sur la 20 loko, Polujo kun 683 poentoj, la tria Belgio kun 1747 poentoj. La lastan lokon okupas Usono kun 1597 poentoj.

★ ★ ★

IEL membroj en 61 landoj estas entute 13.487. En 1938 pro perdo de multaj membroj en Aŭstrujo, Ĉeĥoslovakujo kaj Japanujo la nombro de membroj malplimultiĝis

je 446. Sed kotizoj en la komenco de unua jaro eniras multe pli larĝe kaj akurate, do oni povas esperi, ke IEL en la nuna jaro kreskos. Nur estas necese senlace laboradi. Se ĉiu ano, laŭ la konsilo de s-ano Malgren varbos nur unu esperantiston, kiel individu-an membron, tiam IEL ricevos fortan bazon por la plua ekzisto.

S-ro Scherer publikigas konfidencan leteron al ĉiuj esperantistoj koncerne la gravan esp. filmon.

La titolo „Idiota militamuzo“ povas havi la danĝeron por la filmo, ĉar la teatroj en certaj landoj ne allasos ĝin por ne akiri la antagonismon de sialandaj armeestroj. En la landoj, kie oni persukutas pacifismon, reklamo kaj varbado por la filmo povus fari domaĝon al la lokaj esperanto-movado, kaj al la filmo mem. La artikoloj kun diversaj klarigoj aperos baldaŭ. (Scherer).

Antaŭ 10 jaroj en Zagreb kelkaj junuloj aranĝis Esper. Klubon, kiu nun multe plifortigis la ĝeneralan esp. movadon en la Jugoslavujo. 27 de februaro la klubo festos sian 10-jaran jubileon. Adreso por bondeziroj: Akademia Esp. Klubo, Primorska 2, Zagreb, Jugoslavujo.

S-ro Rollet de l' Isle publikigas interesan artikolon pri instruado de la esp. lingvo. Kvankam ĝi estas dekoble pli facila, ol iu ajn eŭropa lingvo, tamen oni devas instrui, ĝin pograde: por komencantoj per la Cseh-metodo, kaj por perfektigo gramatikaj kaj stilaj kursoj.

Bulgara samideano Nikola Jotof fariĝis Ministro de Justeco.

Treege interesa artikolo de Lord Daviers pri la Nova Komunumo meritas specialan priparolon.

Heroldo de Esperanto, n-ro 5. Sur la unua paĝo ni vidas fotografan bildon de unu el plej meritaj Brazilaj samideanoj, S-on Ismael Gomes Braga: aŭtoro de Veterano, libro skribita dum la Jubilea Kongreso, fervora propagandisto, kiu oferas siajn ĉiujn fortojn por la propagando de nia lingvo.

Se la lingvo dum lastaj jaroj en Brazilo disvastiĝis, la kialo estas, ke en la lando ekzistas similaj propagandistoj, kies nomojn parte ni jam publikigis. Al ili apartenas unuagrade nia kara samideano Gomes Braga.

En 20 superaj kaj mezaj lernejoj de Francujo oni havas esperanto-instruejojn. Cititaj nomoj de profesoroj, kaj nombro de lernantoj. Daŭrigo de interesa artikolo: unuaj rilatoj de Japanoj kun eŭropanoj.

Internacia Pedagogia Revuo, n-ro 1. Memorigas pri la Ĉeĥoslovaka Pedagogia Enciklopedio, kiu indas plian disvastigon. Montessori-Lernejo en Anglujo estas modela lernejo por diversaĝaj infanoj. Lernado, la-

boro kaj ludado estas bone organizitaj. Ekspozicio pri infandeseĝnaĵoj; 17 landoj ĝin partoprenas. Polujo ne estas reprezentata. Lerneja filmarĥivo. En Svedujo oni uzas nun 16 mm filmon, ĉar ĝi estas malmultekosta. Diversaj distriktoj unuiĝis por aĉeti unu filmon kune. Imitinta ekzemplo.

Nederlanda Esperantisto, n-ro 3. Prave dirite: Ni bezonas fortan organizaĵon, por ke ni puŝu la ĉaron en unu direkto. Ĉiuj privataj puŝetoj estas vanaj kaj malutilaj. Ili povas nur ĝeni. La Rotterdama Kongreso estos tre interesa per la vizitado de riĉa kolekto de pentraĵoj de antikvaj kaj modernaj majstroj. Inter aliaj granda kolekto de Rembrandt.

La Revuo Orienta, n-ro?. Februaro. Alvoko de D-ro Hazime Asada. En Japanujo oni lernas la anglan lingvon en liceo 4-6 horojn semajne. En la pli alta lernejo oni lernas semajne 13 hor. germanan aŭ francan lingvojn kaj 3 hor. anglan. En la fakaj lernejoj medicinaj kaj aliaj oni lernas 4-5 hor. anglan kaj germanan. Malgraŭ tio ĉio la lernantoj ne bone komprenas fremdajn lingvojn. Oni perdas tiom da tempo, ke jam estas tempo forĵeti ĉiujn aliajn lingvojn kaj uzadi nur unu esperantan. Kun fremduloj Japanoj devas uzi nur Esperanton, kaj interne en Japanujo oni devas enkonduki latinan alfabeton.

La Kritika Observanto. Nova adreso: 12 Great Castle Street, London W. 1. Jack Walfon Sekr. Interesaj politikaj pripensoj pri nuna situacio de mondaj problemoj. Artikolo de Frederiko Kempf postulas kreon kaj subtenon de politika kaj ekonomia Balkan-Unio, kio estas ne nur por interesoj de balkana loĝantaro, sed ankaŭ por packonservo de Eŭropo. La artikoloj de Pierre Robert kaj de Rommanohar Lohia: Hindio kaj Brita milito estas legindaj. Hinda popolo devas lukti por sia libereco.

La Praktiko, n-ro 1. Januaro. S-ino Julia Isbrücker iniciatis komitaton en Hago, kies celo estas enkonduki esperanton kaj ĝian sisteman uzadon ĉe la industrio, komerco, trafiko kaj ĉie, kie la uzado de la helpa lingvo povas esti bezonata kaj utila. Unue komenciĝis en Hago grandaj kursoj por la landa Komitato por la policistoj. Jam 132 policianoj partoprenas la kurson. En la Nederlanda Komitato por la praktika aplikado de Esperanto partoprenas aŭtoritatuloj de la urbo kaj ŝtato. Direkcio de mondkonataj Philips-fabrikejoj en Eindhoven decidis uzi esperanton paralele al aliaj uzataj lingvoj ĉe siaj reklamoj kaj informaj presaĵoj. Brita Internaciista Asocio postulas internacian lingvon. Se tiu ĉi granda asocio kun multaj filioj en grandaj kaj mezgrandaj urboj de

Britujo rekomendas helpan lingvon por ĉiuj siaj anoj, tio signifas grandan paŝon en la brita Esp. movado. Bonvolu ĉiuj samideanoj skribi al: The Education Secretary of Nations Union 15 Grosvenor Crescent London SW 1 pri valoroj de Esperanto ĉe la interrilatoj eksterlandaj kun ĉiuj nacioj de l'mondo. Multaj interesaj sciigoj: en Japanujo en novembro okazis 600 tertremoj; neniam okazis tiom multaj. Entute tre interese redaktita n-ro (ĉu ne plej interesa gazeto?).

Brita Esperantisto, n-ro dua (406). Februaro. Unuiĝu Instruistoj esperantistaj - estas la devizo de B. E. A. Tiu ĉi alvoko troviĝas ankaŭ anglalingve en la n-ro. Estas ja vigla organizo internacia T. A. G. E., sed necesaj estas naciaj societoj por prizorgi la lokajn teritoriojn. 34 skota kongreso en Edinburgo 19-22 majo.

Norvega Esperantisto. Januaro. Kola Aĵayi konata samideano el Nigerio faris publikan prelegon en Hagesund.

Lingva Auxiliario, n-ro 38, gazeto portugallingva eldonata de s-ino Maria Ieda de Morais, destinita por Brazilo, Portugalujo kaj portugaliaj kolonioj. Propagandaj artikoloj de s-ano Gomes Braga, S-ano Maria

Ieda Morais, s-ro Paulo Jaques, Policarpo de Amarante, Mario Meira, kiuj pruvas, ke esperanto subtenas kaj grave helpas amon de ĉiu patro'ando same kiel amon de paco kaj homaj idealoj.

Jugoslavena P. T. T. Organo de la As. de P. T. T. oficistoj. Belgrado. Enhavas esperanto-angulon. Artikolo — alvoko al ŝtataj oficistoj, ke ili kiel intelekta parto de popolo devas esti portantoj de sanaj perceptoj kaj socia progreso.

Voĉoj el' Oriento, n-ro 9. Alvoko de s-ino Soong Ching-ling, vidvino de d-ro Sun Yat-Sen al Tutmonda Junularo — Kongreso en Usono. Priskribas terurajn suferadojn de la Ĉina popolo, precipe de virinoj kaj infanoj dum la kruela milito kontraŭ Japanujo, kiu invadis kaj malkonstruas la landon.

Belga Esperantisto n-ro 2. Invito al la Kongreso en Lovenio dum Pentekosto. Lovenio, bela flandra urbo. La programo estos fiksota en la proksima n-ro. Grupaj raportoj el: Antverpeno, Bruĝo; kelkaj raportoj: de d-ro Kempenneers gajiga konferenco de s-ino de Rijcke, instruplena de s-ro Vandeveld. O. B.

SKOLTA ANGULO.

Oficiala klarigo de pola SEL.

Koncerne la artikolon en „Skolta Angulo“ de P. E. s. t. „Hungara SEL gratulas al pola skoltaro“ mi devas klarigi, ke interŝanĝo de la leteroj inter mi kaj s-ro Balkanyi okaze de reakiro de polaj teritorioj en Post-Olza Silezio estis tute privata persona afero inter mi kiel polo kaj s-ro Balkanyi kiel hungaro, kaj havis nenion komunan kun nia SEL-agado. Per tio ĉi mi volas substreki, ke SEL kiel organizaĵo internacia estas tute apolitika, pure skolta kaj esperanta.

Józef Toczyski
SEL-agento por Polujo.

NOVAĴOJ EL POLUJO.

Skoltoj laboras — kaj instruas.

Vilaĝa Universitato ĉe skolta instrucentro en Górki Wielkie (Silezio) ekkomencis

klerigan kurson la 3 de novembro por vilaĝanoj. La kurso daŭros ĝis 5 aprilo 1939. Ĝi estas jam dua jaro de laborado. Vilaĝa Universitato en Górki Wielkie — estas kleriga posteno de pola skolta laborado je la socia kampo — kaj havas en programo prelegojn pri polaj historio kaj literaturo, sociaj sciencoj kaj agrikulturo.

Internacia enketo.

Pola Skoltasocio aranĝis internacian enketon pri labormetodoj kaj kutimoj — karakterizaj por la naciaj diversaj skolt-organizaĵoj. Ĝis nun sendis respondon skoltoj el Usono, Anglujo, Norvegujo kaj Francujo. Skoltoj Esperantistoj estas petataj, ke ili postulu programon de la enketo de Związek Harcerstwa Polskiego — Wydział Zagraniczny, Warszawa, Łazienkowska 7.

SED TAMEN...

*Atestas ĉiu tag' pasinta,
Ke vivo estas miskompren'
Kaj vanas penoj serĉi pacon
En ĉiu milda ĉirkaŭpren'.*

*Sed tamen vivi mi deziras,
Eĉ se similas al infer',
La vivo mia, kiun gvidas
Anstataŭ Dio, Lucifer'.*

Ludmila Jevsejeva.

MI LEGAS...

*Vent' fajfas, neĝ' kovras la montojn kaj valojn,
severa, malvarma vintr' regas,
en mano revuojn, malnovajn analojn
mi tenas kaj legas, relegas...
En tubo kamena vent' ploras, ekridas...
dibočas sur kampoj, rabias...
en varma ĉambreto ĉe forno mi sidas
kaj legas, relegas, folias...
Kaj dancas, turniĝas, falantaj neĝsteloj,
mi legas, parkere eklernas...
versaĵoj, recenzoj, rakontoj, noveloj...
postvenas, sinsekvas, alternas...*

.

*Mi legas... Jen Bujwid parolas, prelegas...
certigas kaj pruvas obstine,
li nin kuraĝigas, li forte kredegas,
ke tamen Ĝi venkos finfine.
Jen Belmont pollingve tradukas „L'Esperon“,
L'Esperon - plenplenan de famo,
jen Mantel Minuszka parolas misteron,
en sia — Ha, ha! Pro la amo!“...
Jen Tońko kaj Szczepko kun Chwostek humore,
en „Gaja Lvov-Ondo“ diskutas...
jen Dreher kun Orzech konvinke, fervore...
pri lingvaj problemoj diskutas...
Jen nomoj de Dratwer, Sygnarski, Chmieliński,
jen verkoj, recenzoj iliaj,
Gielb, Mayer, Szapiro, Toczyski, Czubyński,
Matwiejczuk... kaj multaj aliaj.
Mi legas, relegas... vent' hurlas, ĝemblovas...
forpasas la horo post horo,
legante mi revas, ke tamen ne povas
vanresti la nia laboro.
Mi kredas, kredegas per kredo sen limo,
je granda, porhoma Digraco:
ke tamen forpasos neĝtrombo- Fikrimo,
kaj venos printempo — La Paco!*

.

*En tubo kamena vent' ploras, ekridas...
dibočas sur kampoj, rabias...
en varma ĉambreto ĉe forno mi sidas
kaj legas, relegas, folias...*

RADIO.

Per radio Esperanto eniras sur kampon vere praktikan! Subtenu la E. dissendojn
Skribu al la stacioj!

PROGRAMO DUM FEBRUARO

La horoj estas indikitaj laŭ mezeŭropa tempo.

REGULAJ ĈIUSEM AJNAJ DISSENDOJ.

Dimanĉe:

10:10—10:25 Kortrijk (204 m) Kroniko de G. Debrouwere.
19:00—19:30 Reykiavik (1442 m) Esperanto-kurso de TH. Thordarsen.
22:30—22:45 PRC 7. Mineira (960 kil.) „Momento de Esperanto“.

Lunde:

18:45 — 19:00 Montpellier - Languedoc (224 m) Kroniko de A. Capoulade.
20:00—21:00 JV 2 RL Caracas (51,72 m) Parolado.
21:50—22:10 2RO 3 (31,13 m) Semajna informado.
23:45—0:30 Paris PTT (431 m) Esperanto-teatraĵo.

Marde:

18:00 — 18:10 M. Ostrava (269,5 m), Parolado.
21:20—21:35 Kaunas (1936 m) Klaipeda Memel 531 m) Lyiae (35 m) „Nia anguleto“.
22:00—22:10 Turi (410 m), Tartu (579 m), Tallinn (229 m) E. kroniko.
23:35—23:40 PRF3 (31:58 m), PRF2

(780 m), Rio de Janeiro, Oficialaj informoj kaj kantoj dum la „Horo de Brazilo“.

22:25—22:40 PRF3 Sao Paulo (960 m), informoj kaj kurso.

Merkrede:

2:45—3:45 XECR (50:17 m) Mexico — Esperanto-kroniko.
15:00—15:20 Paris PTT (431 m) — E. kurso de C. Roseau.
21:00—21:20 LTI Radio del Litoral. Rosario: Kroniko.

Vendrede:

2:45—3:45 XECR Mexico (50:17 m) — Kroniko.

Sabate:

10:30—11:— 7 HO HOBART — E. kroniko.
16:15—16:30 Loksbergen-Limburg (202 m), Esperanto-kvaronhoro.
18:40 — 19:00 Roma II (245 m); IRF (30:52 m) kaj 2RO9 (31:02 m) — Turisma kroniko.
22:25—22:40 PRFA Sao-Paulo (960 m) Informoj, kantoj kaj kurso.
0:30—1:00 Barcelona (377 m), Pri Hispanujo.

PLI OFTAJ ELSENDOJ PER RADIO EIREANN.

Jen la programo por la estontaj disaŭdi-
goj de Radio Eireann (531 metroj):

Tria Mardo-21a Februaro * (15 min) V. Daniel O'Connell.

Unua Dimanĉo-5a Marto * (15 min) VI. Patrick Pearse.

Tria Mardo-21a Marto * (15 min) SPORTLU-
DOJ EN IRLANDO.

Unua Dimanĉo-2a Aprilo * (15 min) Irlan-
da Influo en Eŭropo.

Tria Mardo-18a Aprilo * (15 min) Eŭropa
Influo en Irlando.

Unua Dimanĉo-7a Majo * (15 min) EKO-
NOMIA STATO DE IRLANDO.

* Preciza horo ne fiksita — proksimume
kiel en Decembro.

Ni afable petas vin diskonigi tiun ĉi pro-
gramon inter viaj amikoj kaj en via klubo.

Parizaj teatraj elsendoj en danĝero!

La lundvesperaj radio-prezentadoj de tea-
traĵoj originalaj aŭ tradukitaj ludataj pli kaj
pli bone de profesiaj aktoroj pere de Paris
P. T. T. tre verŝajne ĉesos, se la aŭskul-
tintoj kaj aliaj samideanoj ne aŭdigos for-
tan voĉon.

Se vi regule aŭ kelkfoje aŭskultas, sendu
leteron aŭ eĉ nur poŝtkarton al: »Courrier
des Auditeurs«, Ministère de P. T. T., 107
rue de Grenelle, Paris VII por esprimi viajn
gratulon kaj dankon kaj eventuale eĉ kri-
tikon.

Se vi ne aŭskultas pro la mafrua horo,
skribu tamen por peti pli fruan disaŭdigon.

Nepre faru tion. Ni ne perdu tiun gravan
postenon, kiu estas bonega propagandilo kaj
konvinkilo por en- kaj eksterlandaj radio-
kaj aliaj oficialaj instancoj. Savu la teatrajn
elsendojn!!!

KATOLIKA ESPERANTO MOVADO.

KARAJ GESAMIDEANOJ.

Je mia alvoko lasta tiom multe da demandoj alfluis pri Espero Katolika, la oficiala organo de IKUE. Por opa korespondado mankas al mi tempo kaj mono, do mi ĉi tie respondas al ĉiuj demandintoj. Kelkaj dubas, ĉu Espero Katolika efektive estas tiel bela kaj riĉenhava revuo, ĉu valoras aboni ĝin. Mi povas certigi vin jese; ĉiukaze valoras aboni kaj legi ne nur por katolikoj sed ankaŭ por alikonfesuloj, ĉar efektive ĝi estas bela, ilustrita, riĉenhava kaj... malkara revuo, ĉar simpla jarabono kostas 4 zł kaj en tuta Esperantujo oni ne trovos pli malkaran. Specimenon sendas

M. Janik Świerklany, kontraŭ pago de 55 groŝoj je PKO. 303-779 aŭ en poŝtmarkoj. La adreso estu skribita tre legeble.

Membro de Pollanda Katolika Ligo Esp. povas fariĝi — laŭstatute — ĉiu katolika praktikulo, ĉiu rondo esp., societo, aŭ sekcio katolika ĉe iu ajn asocio.

Ĉiu membro de Pol. KLE aŭtomate aliĝas al Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista kaj rajtas apliki ĝian regularon.

Statutaron de Pollanda Katolika Ligo Esp. pollingve oni ricevas ĉe sekretario-kasisto por 30 gr kun sendkosto.

**Maksymilian Janik,
Świerklany pow. Rybnik.**

NOVAĴOJ EL ESPERANTUJO.

NATURISMA ESPERANTISTA ASOCIO.

Sidejo: Randers (Danujo).

Konsisto: la asocio konsistas el naturistaj organizaĵoj kaj individuaj personoj.

Celoj:

disvastigi Esperanton inter la naturistoj kaj naturismon inter la esperantistoj,

helpi kaj antaŭenpuŝi la internacian naturisman movadon kaj solidarecon inter naturistoj de ĉiuj landoj,

plifaciligi la rilatojn inter naturistoj de la tuta mondo, uzante esperanton,

zorgi pri la kunagado de naturistaj organizaĵoj,

krei naturistan literaturon en Esperanto.

eldoni internacian naturistan gazeton, revuon aŭ bultenon en Esperanto, aranĝi vojaĝojn en la naturismaj centroj kaj kunvenoj en la libera aero,

krei diversajn servojn utilajn al la membroj, ekzemple: librogazeto, revuoservo (kiuj celas havigi al membroj rapide kaj facile naturismajn verkojn kaj eldonaĵojn), informservo pri naturismaj kaj esperantistaj aferoj,

konigi ĉiujn bonajn movadojn, kiuj dediĝas al la plibonigado de la homaro.

POLLANDA KRONIKO.

LWÓW. Societo Esperanto en Lwów, urbo de la sekvonta tutpollanda kongreso, novan Esperanto-jaron ekkomencis en septembro per vigla laborado.

Dum la somero vizitis la Societon kelkaj geesperantistoj en- kaj eksterlandaj, inter aliaj — simpatia Laponia samideanino Elsa Nyberg ĉe fino de julio kaj samideano M. Heyrouiti el Tel-Aviv en Palestino — ĉe komenco de septembro.

22/IX 1938 — Lvovaj »londonanoj« F-ino Wala Sołtysik kaj S-ro Józef Toczyski raportis pri la XXX U. K. Al prelegintoj en koraj vortoj dankis honora prezidanto de la Societo Dr Izrael Fels.

13/X 1938 — okazis solena malfermo de la kurso — dum kiu bele recitis parton de »S-ro Tadeo« F-ino Sołtysik.

20/X 1938 — Lvova I. E. L'o-delegito, S-ro Toczyski prelegis pri „Nuna stato de

Esperanto-movado kaj niaj devoj«. Prelego estis dediĉita al la propagando de I. E. L.

10/XI 1938. Okaze de sendependeco de XX-jara dat-reveno de reaktiro de sendependeco de la Pola-Ŝtato Societo-Esperanto en Lwów aranĝis solenan vesperon, kiun per solena antaŭparolo malfermis prezidanto de la Societo S-ro Toczyski.

Sekve polonezon de Chopin majstre pianludis direktoro de Lvova Muzik-Instituto S-ro Roman Fischler. Referaton s. t. »Polujo kaj Esperanto« tralegis S-ino Mgr Kleinova. »Jaro 1812« el »Sinjoro Tadeo« de Mickiewicz — recitis F-ino Sołtysik. Solenaĵon finis pianludado de direktoro Fischler: »Itala koncerto« de Bach.

Urbprezidanto S-ro Ostrowski, kiel sian reprezentanton sendis urb-konsilanton s-ron Kowalski S-ro Profesoro Bujwid sendis gratul-leteron.

SZAMOTULY. La „Gimnazia Esperanto-Rondo“ dum la jaro 1938 vigle laboradis, subtenita ree per monhelpo de 50 zł, kiun ĝi dankis al la „Gepatra Rondo“. La kutimaj kursoj por komencantoj kaj progresintoj laŭ la lernolibro de prof. Sygnarski estis daŭrigataj; ĉe fino de la lernejjaro 18 kursanoj ricevis oficialajn atestojn pri partopreno. Tre vigla estis la korespondado kun eksterlando, precipe kun Nederlando. Danujo, Svedujo, Norvegujo, Latvujo, Ĉeĥoslovakio, Hungarujo, Anglujo, Ameriko: entute estis forsenditaj pli ol 80 skribaĵoj kaj preskaŭ la sama nombro ricevita. La adresojn la grupanoj ĉerpis precipe el la bonega junular-gazeto „La Juna Vivo“. La grupo estis aranĝinta du Esperanto-vesperojn, el kiuj la lasta estis dediĉita al la longjara gvidanto de la grupo, s-o B. Maske, prof. gimn., translokigita al alia lernejo, en Rogoźno. La Gimnazia Esperanto-Rondo en Szamotuły montris tamen jam tian viglecon, ke malgraŭ tiu ŝanĝo ĝi povos plue laboradi kaj disvolviĝi.

WARSAWA. La 9 de XI, en la sidejo de PEA, Al Jerozolimskie 7, S-ino Cense raportis pri siaj spertoj en Jugoslavujo, dum kaj post la kongreso de IKUE. La ĉeestantoj, kiuj atendis la kutiman sekan raporton pri la kongreso estis agrable surprizitaj. La raporto de S-ino Cense estis humorplena, vigla kaj tre interesa. Ŝi prezentis la landojn kaj urbojn vizititajn, la popolojn fratajn kaj diversajn, la koran akcepton de ĉiuj. Ŝi raportis pri siaj agrablaj vizitoj al la vilaĝanoj, pri ilia bonvolemo montri siajn belegajn naciajn vestojn; pri la arto nacia, kaj pri la ĉiam ripetata domando: Ĉu vi iam revenos al ni? Ŝiaj rimarkoj estis spertaj kaj pruvis ŝian sperton pri agrabla kaj utila vojaĝmaniero. La raporto incitis la aŭskultantojn al veturo por konatiĝi kun la simpatiaj kaj intetesaj popoloj fratslavaj! Oficiala reprezentanto de Jugoslavujo ĉeestis la paroladon kaj kore gratulis la raportintinon. Li konfesis, ke kvankam li ne-

niam antaŭe aŭdis la sonojn de la lingvo Esperanto, li tre bone sekvis la enhavon de la parolado.

La 14-an de XII, en la salonoj de PKO, Marszałkowska 138, PEA organizis paroladon por siaj anoj kaj iliaj invititoj. La temo de la parolado estis „Bretonujo“. Parolis jam tradicia paroladantino, S-ino Cense. Vestita per sia belega nacia vestaĵo, S-ino Cense prezentis sian „pli malgrandan patrujon“ per belegaj ilustraĵoj. Ŝi skizis la historion de la duoninsulo. „Bretonujo estas granita bloko, sur kiu la homoj, per sia laborego „faris“ teron tiel produkteman, ke oni diras pri Bretonujo, ke ĝi estas zonita per oro. „Sur nia duoninsulo, ĉio estas el granito, krom la koroj, diris S-ino Cense. Oftaj miresprimoj dum la parolado, kaj daŭraj aplaŭdoj post la fino dankis la parolintinon. La aparato por la lumbildoj estis pruntita de la Franca Instituto, kiu estis reprezentita ĉe la kunveno, kiel ankaŭ la Pola sekcio de la „Federation de Professeurs de Français à l'Étranger“. Ili kore gratulis sian kuncivitaninon.

S-ino Cense posedas serion da paroladoj pri Bretonujo. La vasta kaj interesa temo estas dividita en 3 paroladoj, kun belegaj lumbildoj (epidiaskopo), kaj tiun pri Jugoslavujo kaj la kongreso de IKUE, ankaŭ interesege ilustrita. Ŝi estas je la dispozo de la grupoj. Kiuj dezirus aŭdigi ilin de siaj grupanoj kaj invititoj? Ĉu ne bona maniero por ekinteresi diversajn landojn al Esperanto kiel propagandimedo? La kolonioj Franca kaj Jugoslava en Varsovio tre interesiĝis pri tiuj paroladoj. La interesataj Grupoj bonvolu skribi al S-ino Cense por interkonsenti pri detaloj; Marszałkowska 33-3, Warszawa.

La pri paroladoj estas: Historio de Bretonujo kaj ĝia rolo en la franca historio. Geografio kaj arto en la arkitekturo, karaktero kaj vivo, kutimoj prapatraj plejparte konservitaj ĝis nun.

**Kiu deziras plezure
pasigi libertempon,**

**tiu akiru amuzan kaj
internidean poemaron
de B. Giedra**

V I O L E T O J

Bona stilo! Bela eldono! Laŭdaj recenzoj!
64 pĝ. Prezo — 0,25 dol. aŭ egalvaloro.

Liveras: Esperanto Libro-Servoj
kaj Litova Esp. Asocio, Žemaičiu 15
Kaunas, Litovujo kaj Administracio
de Pola Esperantisto.

ESPERANTISTA CENTRA LIBREJO

11 rue de Sèvres, Paris (6^o) (Francujo)

poŝtĉekkonto: C. C. P. Paris 196-01
liveras ĉiujn esperantajn verkojn, ĉefe la
Zamenhofajn.

★ ★ ★

**NI TRE AFABLE PETAS NIAJN ABO-
NANTOJN, ŜULDANTAJN ANKORAŬ LA
ABONON POR J. 1938, PAGI LA ŜULDON
JE NIA KONTO PKO Nr 406.660. EKABO-
NU POR J. 1939.**

UZU LA ALDONIGAN POŝTĈEKON!

BONEGA PROPAGANDILO!

Brazilaj poŝtmarkoj kun esp. teksto de IX Intern. Specimena Foiro kaj IX Brazila Kongr. de Esperanto haveblaj ĉe admin. de „Pola Esperantisto“ po 20 gr por peco. Aldonu 25 gr por poŝtelspezoj. Ni akceptas ankaŭ neuzitajn poŝtmarkojn kiel pagon.

★ ★ ★

**ĈU VI VIDIS EKZEMPLERON DE
SCIENCA GAZETO**

aŭ

NOVA BULTENO?

Se ne, petu ilin tuj senpage, poŝtkarto sufiĉas!

Adresu:

**American Esperanto Institute Rockford,
Illinois, Usono.**

★ ★ ★

GRAVA AVIZO!

Reprezentanto de la dumonata, 24-paĝa, ilustrita „SCIENCA GAZETO“ estas por Polujo la administracio de Pola Esperantisto. Abonprezo jara (por Polujo malaltigita) 4 zł, pagata je konto de „Pola Esperantisto“, konto P. K. O. Nr. 406.660. Abonante nun, vi ricevas ĉiujn numerojn de post januaro k. j. Ĉiu klera homo, por kiu ne estas indiferentaj la plej novaj sciencaj temoj — devas nepre aboni la revuon!

Ĉe pagoj rimarkigu ĉiam la celon!

Abonu por jaro 1939!

NOVA BULTENO

Sendependa revueto pri la Esperanto-movado.

Aperas provizore dumonate.

Enhavas: La Esperanto - Movado (novaĵoj)
Recenzado de libroj. Ĉu vi legis?
(interesaj elĉerpaĵoj el la Esperanta gazetaro). Literaturo, anoncetoj.

Nova abonanto ricevas 2-linian anonceton senpage.

Sendu vian anonctekston.

Jarabono internacia: 2 poŝtaj respondkuponoj.

Amerika Esperanto-Instituto

Rockford, Illinois, Usono.

★ ★ ★

Ostatnia obniżka ceny!

Naukowe Koło Esperanckie obniżyło cenę na podręcznik szkolny p. t. „LEKCJE JĘZYKA ŚWIATOWEGO ESPERANTO“ w opracowaniu prof. SYGNARSKIEGO (wyd. II. aprobowane powtórnie przez Ministerstwo WR i OP) na 1— zł. Wpłaty i zamówienia kierować należy pod adresem: N. K. E. Bydgoszcz, pl. Wolności 9 (konto P. K. O. Nr. 210.647) lub administracji Pola Esperantisto (Kraków, ul. Lubicz 34) konto P. K. O. Nr. 406.660. Przesyłka 15 gr.

★ ★ ★

UWAGA!

Wszelkie wpłaty abonamentu miesięcznika „Pola Esperantisto“ uskuteczniać można na konto PKO. Nr 406.660 lub **przekazem rozrachunkowym, kartoteka Nr 29**, co zaoszczędzi wpłacającym koszty przesyłki.

ABONO: jare zł 8.—, duonjare zł 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł 6.—. Eksterlande 7 sv. fr. Aparta numero zł 0.70, duobla zł 1.40.

ANONCOJ: 1/2 paĝo zł 30.—, 1/4 paĝo zł 15.—, 1/8 paĝo zł 10.—. Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł 1.—.

PRENUMERATA: rocznie zł 8.—, półrocznie zł 4.—. Dla Towarzystw i grup esperanckich rocznie zł 6.—. Zagranicą: 7 fr. szw. Numer pojedynczy zł 0.70, podwójny zł 1.40.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł 30.—, 1/4 strony zł 15.—, 1/8 strony zł 10.—. Korespondencja: małe ogłoszenia z 10 słów (prócz adresu) zł 1.—.

Przekaz rozrachunkowy: kartoteka Nr 29, Kraków 2. — Konto P. K. O. Nr 406.660.

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKÓW, LUBICZ 34.